3.ª JARO N.º 33 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 MARTO 1938

# Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## ZIGZAGO

En la flusoj k malflusoj de nia milito, nun oni devas registri bedaŭre la perdon de Teruel, fortika citadelo, kiun nia Armeo gajnis dum unu semajno; la malamiko eluzis du longajn monatojn por ĝin reakiri, nur dank' al imponegaj lavangoj el kanonoj k aviadiloj, kiujn la kanajla politiko de la Ne-Interveno havigas al la ribeluloj. La rezisto estis ebla, per ofero de multaj vivoj, k nia Registaro ŝatas pli la vivon de kelkaj soldatoj ol posedon de duongradaj pozicioj.

Sobraj en la ĝojo k en la malĝojo, ni ne bezonas svingi ŝablonajn sofismojn, por blovi optimismon sur malfavoran aspekton de tiuĉi momento. Nia optimismo—sekura k firma, kiel ĉiam—ne nutras sin per ajna efemera epizodo, feliĉa aŭ malfeliĉa, de hieraŭ hodiaŭ k morgaŭ. Nia optimismo kuŝas sur la roko granita de propra konvinko je nepra k definitiva venko, ne skizita per vanta revo, sed forĝita per oferoj sennombraj sur la batalkampoj, aŭ per intensa laborado apud maŝino k plugilo. Al tio konscie ni fidas!

Kiam nia Armeo venkis en Teruel, pli grava ol la urbo estis la prestiĝo, pri matura kapablo, porti la operaciojn al elektita zono k fiaskigi tiel danĝerajn planojn de la malamiko. Tiu kapablo jus elpruviĝis en la perfekta bonorda evakuigo de Teruel, delikata operacio—glora malgraŭ dolora—kiu permesis savi lastan homon k lastan pecon de materialo, en kontrasto kun la antaŭa faŝista garnizono, kun episkopo k koloneloj ĉefronte, kiun ni tiel plene kaptis.

Serene k plenfide, ni elportas la zigzagajn fazojn de nia tragedio. Ni ne ŝatas la blufojn! Tiu metodo, ĉe la faŝistoj, estas senbremse aplikata por senkuraĝigi la liberalan opinion. Kontraŭ nia popolo tio ne validas! Sed iomete ni timas, ke la veneno de la dubo trafu la korojn de tiuj bonegaj eksterlandaj geamikoj, kiuj, malproksime de fakta medio, povas fari erarajn deduktojn.

Sekvu nian ekzemplon! Forĵetu la dubojn, ne per stulta kredemo, sed per pli ŝreca laboremo. Kaj certe, post malmulta tempo, en tuja printempo, burĝonos folioj de verda optimismo, pro ĝuo de venkoj decidaj inter abruptaj anguloj de sama hodiaŭa zigzago.

## FABELO TRA LA EPOPEO


Por kompreni la ĝustan signifon de nia lukto, oni ne bezonas esti marksisto aŭ liberecano—nek antifaŝisto!—Sufiĉas nur esti normala morala persono. Ni prezentu parabole simplan k facilan ekzemplon:

En modesta ĉambro el granda domo, iu familio loĝas pace; ĝi ofendas neniun; ĝi plibonigas siajn vivkondiĉojn per evoluaj k laŭlegaj metodoj. Proksime, en aliaj etaĝoj, loĝas najbaroj, kiuj envias tiajn fekundajn progresojn. Iun tagon, unu filo perfida, el la paca familio, priŝtelas la hejmon k malfermas ĝiajn pordojn al fremdaj rabistoj, kiuj detruas la meblojn, ofendas la patrinon k murde vundas la ceterajn fratojn de la perfidulo.

La bonaj gepatroj k la fidelaj filoj havas do, ĉe sia flanko, la pravon k la justecon. Malgraŭ tio, la perfidulo kun la invadintoj, per apliko de la forto, kaŭzas al ili gravajn damaĝojn. Tamen, la viktimoj reagas; ili akiras hazardajn defendilojn k pretigas sin por venĝi la ofendon. Tro naive ili supozas, ke la bono ĉiam devas supervenki la malbonon! Ili atendas logikan helpon de siaj najbaroj, kiuj observante la fiagon devus ĝin eviti, eĉ por propra konveneco. Sed ili ja ne faras tion! Ili rigardas, kvazaŭ boksan spektaklon, la apudan invadon, kies efektiviĝo okazas nur dank' al ilia pasiveco k silento. Kiam la viktimoj serĉas adekvatajn armilojn, por utila defendo, tiam intervenas la ne-intervenintoj, kiuj, forgesante, ke eble morgaŭ, ili mem povas esti la viktimoj, malebligas preni taŭgajn ilojn k solvi juste la konflikton.

Neniel estas necese alnomi la protagonistojn de nia fabelo. Oni donu la dimensiojn de Eŭropo, al tiu fantazia domo, k certe oni havos la veran scenejon de la dramo. La etiko jam ne pezas! Bastardaj sentoj favoras ne la pravan rajton sed la sekan forton, kiu ŝajnas venki... dank' al la helpo de tiuj, kiuj unue fortigas la maljustecon per malfortigo de la justeco k poste forlasas la justecon pro ĝia malforteco, fariĝinte amikoj de la maljusteco pro ĝia forteco... Ĉiu prudenta persono, kun sentema koro, eble pensos amare, antaŭ tiel perversa ludo, ke brilaj teorioj k belaj vortoj, pri harmonio k paco, nur estas laĉo de falsaĵoj; ke la regado de la mondo devas aparteni al la friponoj, tial ke la leĝaj garantioj malkuraĝe forgesis sian dignon k siajn defendokapablojn. Pli ol unu idealista filozofo angore-fatale konkludos, ke oni devas instrui la infanojn malami, anstataŭ ol ami; ke oni devas instrui la homojn terure mortigi, anstataŭ ol hele k bele rideti...

Ne! La hispana popolo ne konsentas al tia pesimismo! Kontraŭ interna perfido, malgraŭ najbara «neŭtralado» k spite al eksteraj atakegoj, ĝi fiere ĵuris batali ĝis fino, por eviti, kun la fizika detruo de siaj urboj, la pereon de ĉiuj moralaj progresoj. Kaj nun, nia popolo—Hispanio!—estas torĉo en la mallumo, espero de ĉiuj soifantoj, pri justo k vero, kiel digna modelo por tiuj potencaj ŝtatoj, kiuj malgraŭ sia forto, kaŭras ĉe la planko de la malindeco, por mizere altigi la vulgaran malaltecon de faŝistaj senhontuloj.



Ĉe balustrado de parko, en urbeto de Sovetio, grupo de hispanaj infanoj, dank' al entuziasma solidareco, forgesas pasintajn dolorojn

# BRAVAJ TEROJ

Por la soldato en kampanjo, la tero havas novajn valorojn, pri kiuj antaŭe li eĉ ne pensis.

Krom la deveno de la produktaĵoj, la soldato vidas en la grundo sian plej bonan aliancanon, kiun oni devas studi k prikalkuli, por ke la sukceso lin akompanu, en ĉi tiu intermiksaĵo de scienco k barbareco, kio ja estas ordinare la milito. Pri tio, obstinaj pacifistoj, kiel ni, akiris sperton per la kruda postulo de la cirkonstancoj.

Alkutimiĝintaj kalkuli ĉiam kun la tero, kiam ni trairas la batalkampojn, aŭtomate k senpripense, nia vidado valoras la terenojn, analizante ĝiajn favorajn aŭ malfavorajn defendokondiĉojn. Se la fusilo estas la plej bona amiko de la batalanto, la tero estas lia plej bona helpanto. Dum la somero, kontraŭ la varmo k, dum vintro, kontraŭ la malvarmo, la batalanto trovas sub la tero la plej bonan ŝirmejon. Sed, precipe dum la batalo, kiam la kugloj krozas la aeron k la maŝinpafiloj, koleraj, fajfas mitralon k la aviacio elĵetas tragike sian malafablan ŝarĝon, estas la tero ankaŭ, kiu per plenama ĉirkaŭbrako akceptas la batalanton, savante lian vivon; k la soldato eklernas tiam ami k studi la teron. Tiamaniere, mi ekamis ĉi tiujn bravajn terojn de Madrido.

Multajn noktojn, kiam post la tagaj penadoj mi serĉas la ripozon en la subteran rifuĝejon fositan de mi mem, mi sentas kiel revivas ĉe mia imago, kun la precizeco de priaventura filmo, ĉiuj dolĉamaraj emocioj pri ne priskribeblaj impresoj, travivitaj sur la batalkampoj de ĉi tiuj kastiljaj teroj, tiom fremdaj por mi nur antaŭ unu jaro, k nun eĉ pli bone konataj ol tiuj de Valencio. Kaj mi vidas tiam, ke Madrido estas io nedisigebla jam de mi. Tial, mi pensas, ke se unuflanke mi preferus batali en aliaj sektoroj, en tiu de Teruel, ekzemple, kiu estas pli proksime al mia hejmo, k kie tiom sukcese ĵus batalis nia tiea Armeo, aliflanke mi pensas, ke vole nevole, la milito por mi estas Madrido. En la fronto de Madrido, mi komencis la militon k mi kredas, ke en la fronto de Madrido mi finos ĝin, aŭ... ĝi finos min! Ĉi tie mi partoprenis unu el la plej grandaj bataloj de nia milito, tiun de nia ofensivo al Brunete, k espereble, ĉi tie ankaŭ mi partoprenos ankoraŭ la plej grandajn k decidajn batalojn por kapti la venkon.

Teroj bravaj de Kastiljo! Mi ne scias pri lirikaj frazoj; en la tranĉeoj oni parolas simplan virecan lingvaĵon; sed pli aŭ malpli bone, ĉi tie, mi volas esprimi al ci, mian admiron por cia heroa rezistado, kontraŭ atakoj plej sovaĝaj de la internacia faŝismo.

Rikardo KILES

*Fronto de Madrido, 16-2-938.*



Tiel amas la faŝistoj sian landon, ke ili transformis ĝin en alloga turista ruinejo

# EKIRO

**ARIO: LA TAGIĜO**

I

Ekmarŝu ni fratoj al hela la tag'
Forskuu la sklavajn katenojn
Finfine ja venis la temp' de la ag'
Neniu do timu la penojn
Kreiĝos en paco la nova epok'
Se firme ni staros simile al rok'

II

Dum ĉeno da jaroj sub prema jugar'
Prapatroj kliniĝis sufere
Kaj dume moŝtuloj en plaĉa senfar'
Traĝuis ĉielojn surtere.
Nun dorsojn rektigu kun venka fier'
Ke sklavo naskiĝis neniu sur la Ter'

III

Al lumo sopiris prapatroj en tim'
Restante en Ter' kiel gnomoj
Nin logas la suno el koto kaj ŝlim'
Ne talpoj ni restos sed homoj
Kantante ni iru al lumo kaj bel'
Venkinte ni staros ĉe suna la cel'

IV

Potenca ja estas la mondproletar'
Lavango kun fort' de torento
Eksonu do fine la marŝa fanfar'
Ĝin portu trans limoj la vento;
Jam korojn batigas estonta batal'
Kaj fratojn kunigas la glorideal'

V

Socio falonta pereos sen glor'
Neniu priploros la falon
Por nova socio nun ek' al labor'
Kreado postsekvos batalon
Kaj frate, komune en plena konsent'
Ni kreos la mondon sur amfundament'

A. PERSSON

Sveda profesoro de Esperanto
lekcianta nun en Francio

# POR GAJNI FIDELECON

Inter la dokumentoj, kaptitaj al la faŝistoj en la Centra fronto, troviĝas skribaĵo tre kurioza, per kiu oni refoje konstatas kiamaniere ili celas malhelpi, ke la nombro, ĉiutage kreskanta, da fuĝantoj pliiĝu. Ja, oni scias, ke granda plimulto el la hispanaj soldato ne simpatias al Franko, sed multaj ne kuraĝas eskapi pro timo al la punoj kontraŭ familianoj. Nur tiam, kiam nekontraŭstarebla decidemo anstataŭas la naturan heziton, pro la sekvoj de foriro, la soldatoj forlasas siajn vicojn k alkuras tiujn de la registaranoj. Ilia ŝancela sinteno estas pravigata, kiel pruvas la aludita dokumento, kiun ni kopias:

«Hodiaŭ mi ordonas al la militaj instancoj, en ĉiuj provincoj de tiu Centra zono, urĝe aresti, en konvena okazo, du aŭ tri unuagradajn familianojn — patro, patrino, gefratoj, prefere maldekstremaj, laŭ via scio — de ĉiu el la soldatoj dizertintaj al la malamiko, ĉar tio estas bona rimedo por eviti la forkurojn. Vi informu pri tiuj dizertoj al la koncernaj armeestroj (provincaj militestroj) cele al urĝa arestado de la familianoj, eĉ se tiuj loĝas en alia provinco. Tiuokaze vi agu pere de mi. Vi atentu tiurilate ankaŭ la petojn, kiujn faru al vi ĉiuj aliaj militaj aŭtoritatoj el la zono. En ĉiu okazo, vi devas oportune informi min.»

Sen tiuj «konvinkigaj» procedoj, la hispana soldataro de Franko estus jam tute disfalinta. Spite al ili, nepre venos la tago, kiam la nuna «guto post guto» fariĝos impona torento.

# OPINIO DE OBSERVANTO

*Respublikana armeo.* — Konsistas el 500.000 homoj, kiuj egalas al 7 jarkontingentoj mobilizitaj, unuanimaj, entuziasmoplenaj al kiuj la popolaj rezervoj povas aldoni duoblan kvanton, morgaŭ mem. La ariergardo akordiĝanta kun la avangardo. Pruvo? Sur 1.000 kilometrojn de la franca landlimo al Madrido, tra Valencio, oni ne vidas eĉ unu ponton, eĉ unu metron de fervoja linio, gvardata.

*Ribela armeo.* — 125.000 italoj, 20.000 germanoj, 15.000 legianoj, 60.000 marokanoj; tio signifas duonon da eksterlandaj dungitaj soldatoj; 80.000 «reketistoj» (monarkianoj), 45.000 «falangistoj» (faŝistoj), 125.000 soldatoj perforte rekrutitaj, ĉiuj el ili ŝancelemaj. Rivaleco, kvereloj. La ariergardo en latenta ribelo. Du homoj deĵorantaj en ĉiu kilometro da fervojo k en ĉiu modesta ponto.

## KUN ĈAGRENO KAJ NAŬZO

# NI KVITANCAS!

Ne mankas indicoj por suspekti, ke la aŭtoro de la artikolo «Evoluaj Fazoj en Hispanio», aperinta en franclingva gazeto *Espagne Nouvelle,* estas pagata de Franko. Ankaŭ ne mankas motivoj por supozi, ke la esperanta traduko de la menciita artikolo servas la interesojn de l' Faŝismo. Se niaj legantoj kredas, ke ni troigas, ni invitas ilin legi mem la rafinitajn kalumniojn, kiujn ĝue represis *Sennacieca Revuo* en sia numero 11 (59) 10. Januaro 1938.

Ĉiam staras, antaŭ ni, la sama terura dilemo: Kio estas pli konvena? Ĉu pasia respondo aŭ digna silento? Kiamaniere kontraŭstari la fiajn akuzojn kontraŭ la homojn, kiuj, kun subteno de la tuta antifaŝista popolo, gvidas la batalon kontraŭ la tiranio? Kiel agi, por pruvi al niaj kamaradoj, ke la enhavo de tiu artikolo celas malfortigi la simpation k helpon de la tutmonda proletaro al la hispana laborista klaso, k ke ĝi samtempe utilas al Franko?...

Se ni silentus, tio povus ŝajni, ke la mensogo estas vero. Se ni simple asertus, ke la artikolo entenas nur falsaĵojn oni dirus, ke ni nenion pruvis. Se ni respondus per ciferoj, citoj k faktoj oni povus diri, ke niaj tekstoj mensogas k tiel senfine glitus la polemiko. Neniel ni sukcesus atingi tiom da disvastigo, kiom postulas la afero, por ke niaj vortoj detruu la mizeran celon de la pamfleto. Ja, tiuspecaj varoj—perfide preparitaj k ruze dissemitaj—ĉiam havas ian efektivan rezultaton, ĉar aliaj gazetoj kopias ilin! Dum honesta refuto neniam povas trafi ĉiujn, kiuj englutis la venenon. Harditaj en tiu ĉi peniga batalo, en kiu ni havas tiom da kontraŭuloj, tiel diversaj k ankaŭ tiel strangaj, ni miras pro nenio. Nenio surprizas nin! Nenio, ĉar nia malamiko estas potencega, k ĝi uzas malavare siajn rimedojn. Sed ni ankoraŭ ne kapablis kompreni la amikecon de kelkaj amikoj, kiuj pretendas subteni la hispanajn proletojn, kontraŭbatalante iliajn respondecajn ŝtatajn gvidantojn, per argumentoj plaĉaj k helpaj al Franko. Ne taŭgas diri ke oni kritikas la ministrojn k ne la popolanojn. Necesas pripensi, nur iomete, por kompreni, ke en Hispanio, la sorto de la popolo tute dependas, en la lukto kontraŭ la Faŝismo, de la sorto de ĝiaj regantoj; sekve tiuj abomenaj demagogiaj atakoj malvarmigas, nepre k fakte, la simpation, kiun sentas la laboristaj amasoj de la mondo por siaj hispanaj klasfratoj. Jen simpla bedaŭrinda vero!

Sen pruvoj, nur per mencio de kelkaj ciferoj k de senĝenaj nekonstateblaj asertoj, absolute kapricaj, oni ĵetas fian koton sur honestulojn, kiuj respondecas pri la venko sur la faŝistajn hordojn de la bandito Franko. Kaj tio estas farita en la nomo de la Klasbatalo! Ni batalados streĉe k kuraĝe, senĉese k senlace. Ni ne jam povas—eĉ ne rajtas—atenti la bojojn ĉe nia vojo. Tiu ĉi babiladeto estu nur kvitanco pri tiu abomenindaĵo, kiu inside informis en *Espagne Nouvelle* k represe aperis en *Sennacieca Revuo* el kies puto ĉerpis la ŝlimon de sama artikolo la franca esperantista monataĵo *Nia Gazeto,* kies koketulinaj okuloj nur havas plaĉajn rigardojn por la internaciaj faŝistaj bravulaĉoj. Kun naŭzo k ĉagreno ni konstatas, ke, pro malamo al popola unueco por la libereco, jam ekamindumas la «rigora» Klasbatalo kun la «rigora» Neŭtralismo. Sed, ho ve, kia klasbatalo k eĉ kia neŭtralismo!...

# ORDONO PLEJ ABSURDA

Kiam la parto el la hispana popolo, kiu ĝemas sub la faŝistaj botoj, supozis, ke jam elĉerpiĝis la kapablo por novaj kruelecoj de la faŝistoj, aperis dekrete iu nekredebla ordono per kiu oni nuligas ĉiujn geedziĝojn, kiuj okazis ekde la 18. Julio 1936. en la regionoj falintaj sub la ribeluloj, post la menciita dato. La barbara ukazo konsistas el jenaj reguloj:

UNUE.—Konsiderante, ke la ĉefgeneralo Franko decidis eksterleĝigi la kontraktojn k interkonsentojn aprobitajn de la ruĝaj tribunaloj, oni nuligas ĉiujn geedziĝojn okazigitajn de post la 18. Julio 1936. en la eksaj marksistaj regionoj.

DUE.—La geedziĝoj, kiuj okazis je tiaj kondiĉoj, dissolviĝos, laŭ tempodaŭro de 48 horoj, post la apero de ĉi tiu ordono. La geedzoj disiĝos k reiros al siaj fraŭlaj hejmoj, kun averto pri gravaj sankcioj okaze de malobeo al ĉi tiu ordono.

TRIE.—La aŭtoritato, per siaj agentoj, zorgos je la nepra apliko de ĉi tiu decido, arestante ĉiujn personojn, kiuj, aluditaj de la ordono, daŭrigos sian geedzan vivon.

KVARE.—De nun, estos nur laŭleĝe validaj la geedziĝoj kiuj okazos laŭ oportunaj kondiĉoj k ritoj starigitaj de la religiaj diocezaj aŭtoritatoj de la Katolika Eklezio.

Kelkaj demandoj ŝprucas nature, post tralego de tiu «jura» monstraĵo: Kia estas la situacio de la gefiloj? kiamaniere dividi la komunajn havaĵojn? Kiel solvi la kreitajn problemojn pri heredorajto k t. p.? La afero ankoraŭ pli komplikiĝas tial, ke la koncernaj geedziĝoj ne povas revalidiĝi, antaŭ pastro, sen konkreta speciala permeso de la Vatikano ĉar, por la faŝistaj reakciuloj, ĉiu geedziĝo laŭ legitimaj leĝoj de la Respubliko estas nur ia speco de konkubineco.

Ni ripetu nun biblian sentencon: Per la frukto oni konas la arbon!...

## HISPANAJ EPISKOPOJ RIBELINTAJ EĈ KONTRAŬ LA PAPO



Jen grafika pruvo, ke ni ne mensogas, kiam ni parolas pri komploto, de dikaj episkopoj k perfidaj generaloj, kontraŭ la legitimoj rajtoj de pacema popolo. En kurioza bildo, apude staras bona kolekto de tiuj falsaj reprezentantoj de Kristo. Ili pretendas jungi, al sia malpura ĉaro, la simplaniimajn kredantojn je Dio, prezentante la hispanan lukton, kiel duelon inter demonoj k anĝeloj. Sed tiuj grasaj «anĝeloj» estas nur trivialaj korteganoj de la riĉaj sinjoroj. Ĉiuj iliaj episkopoj eĉ jam ribele malobeas la sanktajn ordonojn. Spite al konkreta admono, en la faŝista zono de Hispanio, la pastroj ne legis laŭte la lastan enciklikon de la Papo, pro jena substancoplena paragrafo, kiun ĉiu vera katoliko, en la intimeco de sia konscienco, devus zorge primediti:

«Fiksu, amataj fratoj, vian atenton je la kreskanta misuzo—aperanta skribe k parole—por apliki la trifojan sanktan nomon de Dio, kiel banalan etikedon por produkto, pli aŭ malpli kaprica, el homaj ambicioj. Zorgu por ke tiu herezo trovu, inter viaj diocezanoj, la meritatan repuŝon. Nur supraĵaj spiritoj povas erare paroli pri nacia Dio, pri nacia religio k eĉ entrepreni la absurdan taskon enfermi Dion, inter la limoj de unu sola popolo aŭ inter la mallarĝeco de unu sola raso».

La papaj sagoj celas la aŭreolon de Hitler, sed Hitler regas, en la Hispanio de Franko, multe pli ol la Papo malgraŭ la fakto, ke la Vatikano jam agnoskis oficiale la masakrojn de Franko. Kaj la hispanaj episkopoj levas la brakojn sed ne levas la voĉon por legi la enciklikon!

# LA SINDIKATOJ AKTIVE AL UNUECA AGADO

Estas interese konstati la konscian aspiron de nia proletaro al kunfandiĝo k al absoluta kunlaborado en fortika bloko sen breĉoj, kiel decas inter klasfratoj kun sama celo. Tiuj klopodoj progresas k la du grandaj Sindikataroj, C. N. T. k U. G. T. de tago al tago pli intime kontaktiĝas, kunigante siajn fortojn en la sama direkto. Ni ĝojas, prezentante hodiaŭ, al niaj legantoj, ampleksan resumon de la konkretaj proponoj, kiujn ĵus faris la U. G. T. al C. N. T. La hispana laboristaro tendencas al unueco k montras sian streĉan volon al solida fronto! La respondo, kun la proponoj de la C. N. T., sekvos en nia venonta numero. Tamen, ni ĝojas antaŭdiri, ke jam la 17. Februaro okazis en la domo de C. N. T. en Barcelono, la unua kunsido de reprezentantoj de tiu Organizo kun tiuj de la U. G. T. En tiu kunsido, la ĉeestantoj ekzamenis la bazojn de siaj respektivaj organizoj k pritraktis la metodojn por labori plue en proksima diskutado, kiun oni fiksis por tuja dato. Ĉiuj koincidis en tio ke el ĉi tiu historia kunveno, estu sendata frateca saluto al la hispana proletaro, k al la bravaj batalantoj de la Popola Armeo. Ni informos ĝustatempe niajn legantojn pri la sekvoj de tiu grava kontaktiĝo (t. e. de tiuj intimecaj konversacioj, ĉar kontaktiĝo k amikeco ĉiam ekzistis) de la du grandaj laboristaj Sindikataroj de Hispanio.

## BAZOJ PROPONITAJ DE LA U. G. T.

**ARMEO.**—La Interliga Komitato agnoskas la gravajn progresojn atingitajn per la kreo de la Popola Regula Armeo. Ĝi konsideras, ke la laboristaj organizoj devas apogi vigle la Registaron, por pliigi la potencon de nia armeo k ties antifaŝistan spiriton k plifortigi la fratecajn ligilojn inter la kunbatalantoj.

La Komitato decidas, ke la ĉefa tasko de la Sindikatoj estas eviti diferencojn en la ariergardo, por ke la Registaro povu senĝene dediĉi sin al la organizado de la finvenko.

1.—La Sindikatoj helpos intense la Registaron por krei fortajn rezervojn k, tiucele, ili precipe klopodos por la efektiva mobilizo de siaj membroj, plenumante kun entuziasmo la ordonojn de la Registaro. Ili obeos k obeigos antaŭmilitan instruadon k la lernadon pri la uzado de armiloj. Ili evitos malhelpaĵojn, ĉe la industrio, pro foresto de la viroj k tiucele ili penos kapabligi la virinojn por anstataŭi la virojn.

2.—La Sindikatoj de la U. G. T. k de la C. N. T. klopodos akceli politikon de fortikigado, de riparado de vojoj k ŝoseoj k tiel de fervojoj, k de konstruado de rifuĝejoj por la civila loĝantaro, kontraŭ atakoj de aeroplanoj.

3.—La Interliga Komitato penos atingi, ke la ekzistanta interkompreniĝo de la ĉefoj de la armeo, ĉu malnovaj, lojale agintaj, ĉu novaj, eliĝintaj de la popolo, kun la komisaroj, kresku klopodante por ke tiuj komisaroj, nervoj de nia armeo, estu vigle helpataj de la Sindikatoj en sia laboro.

4.—La Sindikatoj prefere atentos sian intiman kontakton kun la batalantoj, por kio ili plue konsideros ilin kiel membrojn, k atentos zorge iliajn bezonojn k tiujn de iliaj familianoj, sen ke tio signifu enmiksiĝo en la milita funkciado.

**INDUSTRIO.**—La Komitato konstatas la neceson, akceli la industrian produktadon de la lando, precipe tiun de la militindustrio, pliigonte la klopodojn de la Sindikatoj tiurilate.

La Komitato penos konservi la ariergardon, firma k disciplinita; ankaŭ veki, ĉe ĉiuj laboristoj, la spiriton de abnegacio k sinofero, kiun postulas la nuna situacio, por ke ili ne neglektu ĉiun klopodon en la laboro, speciale ĉe la militaj bezonoj.

1.—La sindikataraj organizoj C. N. T. k U. G. T. kunlaboros kun la Registaro por rapide kreskigi la militindustrion k igi ĝin plenefike potenca.

La sindikatoj havos al si la urĝan taskon, krei inter la laboristoj viglan spiriton kontraŭ ĉiuspecan sabotadon k pasivecon en la laboro.

2.—Oni adaptos, al bezonoj de la militindustrio, ĉiujn fabrikojn k laborejojn taŭgajn, pro ĝiaj kondiĉoj, kun iloj k maŝinaro.

3.—Kontrolo sur ĉiuj krudaĵoj, speciale sur tiuj, per kiuj sin nutras la militindustrio.

4.—Militistigo k tre rigora kontrolo de ĉiuj transportiloj.

### NACIIGO DE ĈIUJ BAZAJ INDUSTRIOJ

5.—Urĝe oni entreprenos la naciigon de ĉiuj bazaj industrioj. La Registaro devos centrigi tiujn industriojn k ordigi ties disvolviĝon.

6.—La industrioj naciigitaj estos gvidataj de kompetentaj teknikistoj de ĉiu fako, elektataj de la koncerna ministerio, sed atentante por tiuj postenoj la opinion de la laboristoj.

7.—Naciigo de la fervojoj.

8.—La Registaro celu centralizi la bankajn aferojn, tendence al naciigo de la Bankoj.

### NACIAJ KONSILANTAROJ PRI INDUSTRIO K SUPERA EKONOMIA KONSILANTARO

9.—Interliga Komitato proponas, formi tuj la Naciajn Konsilantarojn pri Industrio, kun partopreno de la Sindikatoj, kies tasko konsistos en tio: reguligi la produktadon de ĉiu industrio. Fiksi la prezojn, starigi la salajrojn, difini la profitojn, pristudi la eksportadon k la importadon de varoj k krudaĵoj, ĉiam en konsento kun la planoj de la Registaro.

Tiuj Konsilantaroj dependos de la Supera Konsilantaro pri Ekonomio, kies kreiĝo estas urĝa, cele al la adekvata organizado de la produktado.

### PROFESIA KAPABLECO

10.—Krom la decidoj de la Registaro, k la jam alprenitaj mezuroj pri la profesia k metia kapableco, la Sindikatoj helpos altigi la kulturnivelon de la laboristara amaso, pere de specialaj kursoj.

**KOMUNUMIGO DE PUBLIKAJ SERVOJ.** – La Interliga Komitato rekonas la bezonon pri efektivigo de planoj por reordigi k reorganizi la urbajn servojn, sur la bazo de ilia komunumigo, laŭ ilia graveco k strukturo, por forigi la konfuzon, kiu regas nun en tiu afero.

Ĉar la loĝejoj k bienoj ĉiuklasaj, apartenintaj al la iel ribelintaj posedantoj, estas nun ŝtata propraĵo, la urbaj domoj estos fruktuzataj de la Komunumoj, laŭ leĝoj de la Registaro.

**INTENSIGO DE LA AGRO-PRODUKTADO. KOLEKTIVOJ K KOOPERATIVOJ EN KAMPARO.** – La Interliga Komitato deklaras, ke la du Sindikataj Organizoj faros ĉiajn klopodojn por ke la produktoj de la tero, frukto de la laboro de nia kamparanaro, estu ĉiam respektataj k juste valorigataj, laŭ sia rilato kun la produktoj de la industrio.

La Komitato agnoskas la progresojn, kiujn tiurilate faris ĝis nun, per leĝoj, la Popolfronta Registaro. Samtempe, gi

# Cedo al la cedoj de perfidulo

**La konservativaj lordoj de Anglio jam forĵetis la maskon, ei falsa respekto por la Juro, k montras «demokrataj» regantoj de Francio dubas k hezitas, sen detrui la vastan reton el spionoj, provokistoj k ri se la proletaj k liberalaj amasoj el ĉiuj minacataj teritorioj, «ankoraŭ» ne flaras la danĝeron, k cedas al la sin mem, k ili certe spertos frutempe similan tragedion ol tiu de Hispanio... sen la alta glor**



# LETERETO EL ĈINIO

Al la Redakcio de
POPOLA FRONTO

Tre estimataj kamaradoj!

Kun granda emocio, koregе mi dankas pro via ŝatata ĝazeto. Ĉiam mi povas ĝoje ricevi ĝin, laŭ ĉiu numero, kiun entuziasme mi legadas k eĉ tradukas ion por la ĵurnaloj. Tamen, mi sentas iometan nekontentecon, ĉar mi trovas tre malmultan materialon pri Ĉinio, kiu ankaŭ suferas grandan atakon k kruelan buĉadon de japana Faŝismo; kvankam pri tio, eble niaj tutmondaj kamaradoj ne bezonas mian babiladon. Sendube, Ĉinio jam decidadis longe batali kontraŭ japana despotismo. Tial, miaj samlandanoj devas gajni la grandan simpation de ĉiuj antifaŝistaj geamikoj en la tuta mondo, sed ankaŭ oni devas gajni grandan helpon pli praktikan. Bedaŭrinde, ankoraŭ multaj homoj ne scias, kial la ĉinaj soldatoj tiel arde militas kontraŭ japanaj invadintoj. Oni diras, ke ni estas trompitaj de Sovetio, aŭ ke ni obstine ofendas la japanajn civitanojn. Ho, ne, nel ni devas batali por la justeco k paco de l' mondo. Faŝismo estas minaco kontraŭ la paco. Ni, kun ĉiuj similaj fortoj, devas serĉi reciproke unuecon, kunhelpon! Jen mi forte esperas legi multajn justajn artikolojn pri nia defenda milito! Kun altestima saluto, via

CHANG CHING CHIU

27, 1 - Shin strato - JUNNANFU (Ĉinio)

NOTO DE LA REDAKCIO.—Tre plezure ni aperigas preskaŭ senŝanĝe, kun tuta ĝia ĉarma simpleco, la leteron de nia juna orienta leganto, kies portreton ankaŭ ni prezentas. Se ni ricevas utilan materialon de nia ĉina legantaro certe ni kontente publikigos ĝin, eĉ utile al nia propra hispana afero, ĉar sama malamiko atakas en Oriento k Okcidento. La hispanoj komprenas la suferojn de Ĉinio, kiel la ĉinoj, tre sperte, komprenas la dolorojn de Hispanio.


## TREEGE INTERESE!

La Nacia Patronado pri Turismo preparas la eldonon de tre luksa esperantlingva dukolora broŝuro, kun imponaj fotografaĵoj, pri la detruado de hispana arto sub la faŝistaj bomboj. Ni ricevis la honoran komisión zorgi pri la teknika aranĝo k pri adekvata ĝia distribuo tra la tuta esperantista mondo. La manuskriptoj k la kliŝoj jam kuŝas en plej kompetenta litografejo de Valencio. Laŭ nia supozo, la eldono estos preta komence de proksima Aprilo. Oni povas antĉipi, ke ĝi estos plej bela eldonaĵo k plej efika argumento favora al nia lukto. Kvankam la eldonkvanto estas limigita je 10.000 ekzempleroj, ni decidis sendi unu almenaŭ al ĉiu leganto de POPOLA FRONTO; la restantan provizon ni distribuos laŭ konvenaj k prave fundamentitaj petoj, kiujn ni jam atendas por taŭga prilaboro. Bonvolu do tuj fari la mendojn laŭ tre rigora kontrolo de viaj bezonoj, kiujn ni penos oportune kontentigi.

Skribu al POPOLA FRONTO—Mar, 25—Valencia (Hispanio)


# LA HISPANA VIRINO TRA LA MILITO

En Hispanio, la virino sub la monarkio estis ia pasiva elemento, ekster la kaseroloj k potoj de sia kuirejo. Rilate la viron, ĉiam ŝi estis en malsuperaj kondiĉoj. Jen kia maljusta situacio, kiun la Respubliko solvis, gravurinte en sia Konstitucio la principon pri egaleco de virino, kun la viro, en ĉiuj sociaj k politikaj rajtoj!

Ne mankis susuroj, atribuintaj al tiu kuraĝa leĝdonado la kulpon de ĉio, kio nun okazas. Mizera opinio de kelkaj kanabaj cerboj! La virinoj el nia popolo balotis entuziasme—eĉ pli kompakte ol la viroj—la kandidatojn de la Popolfronto; sen avari siajn klopodojn, kiam la militista ribelo eksplodis. La ĵusa pasiva mastrino de hejmo fariĝis aktiva batalantino sur pavimo de la stratoj. Ŝi okupis sian lokon, helpante sian edzon, sian fraton aŭ sian filon por defendi la leĝajn konkeraĵojn de la demokratio. Poste, ne malabundis eĉ fervoraj junulinoj, kiuj brave luktis k heroe mortis en tranĉeoj de la frontoj. Tamen, tio ne estis ŝia rolo; ekzistis aliaj devoj pli adekvataj por la komuna afero. Tuj, en la fabriko, en la kampo aŭ en la hospitaloj, la virino plenumis delikate k profite la utilajn taskojn, kiujn la viroj forlasis por enviciĝi en la batalionoj de la juna Popola Armeo. Kiel laŭdinda estas nun la stoika konduto de niaj virinoj! Ĉar agnoski tion ne sufiĉas, ni danke diskonigas la decidan apogon de la virinaro en nia terura milito.

Oni povas aserti, ke la virinoj fidas pli forte, je la venko, ol la viroj mem. Ŝi estas patrino, fianĉino aŭ edzino kiu, laborante senhalte aŭ inokulante kuraĝon, por la batalo, al siaj filo, edzo k fianĉo, scias, ke nur pro eltenemo de la nunaj krudaj cirkonstancoj, ŝi restos feliĉa —plene feliĉa k libera!—apud la amataj estaĵoj, kiuj nun batalas por ne plu batali. La virino el popolo ne konas la egoismon. La patrino ne manĝas se la filo malsatas; la edzino ne ripozas se la edzo lacas. Pri karesoj ŝi ne avaras. En ĉiu problemo, ŝi trovas la ĝustan solvon k bonan memoron por la viroj. Ĉiam ŝi diras sen emfazo:—Ili unue!...



Diligente laborante

Por la Respubliko estas agrabla celo flegi la bezonojn de siaj bonaj virinoj. Dum la milito, k post la milito, ilia laboro k ilia influo estos deca al ilia rango, ĉar la socia k politika transformiĝo, pri kiu ni sopiras, efektiviĝos nur laŭ ritmo de komprenemo en la koro k en la saĝo de la virino. Sen ŝia helpo estus tre malrapida la irado. Konvinki la virinon al niaj ideoj estas fundamenta bezono; por tio, oni neniel devas uzadi lirikajn flataĵojn, sed konkrete apliki ŝiajn virtojn k ŝiajn kapablojn. Bedaŭrinde—ho, kruele ĉagrenel—la milito forrabis la plej konsciajn k lertajn virojn. Hodiaŭ, oni ne plene scias pri tio. Ankoraŭ oni ne kalkulis la mortintojn! Jam venos la solena momento, k tiam oni vidos la vakantajn lokojn, kiujn nepre oni devas ŝtopi, per tre ĝentila sindonemo, por la normala marŝo de la vivo.

Kaj la hispanaj virinoj, akurate k serene, deĵoros en respondecaj stabloj, por la definitiva k bela rekonstruado de la lando. Por ke en oportuna horo, la virino estu kompetenta k taŭga, jam zorgas oficialaj institucioj, kiuj nemulte bezonas peni por modli la animojn k profiti la intelektojn de tiuj kamaradinoj, kies milda intuicio perceptas la vokon tre varman, kiun ĵetis heredе tiom da junuloj, mortinte anonime, por ĉies plenĝojo, tra la epopeaj k obstinaj parapetoj de nia brava Hispanio.

# MOZAIKO


● La tuta mondo scias jam, ke Franko vendas ĉion por atingi la bezonatan helpon. Tiucele li sendas la fermineralon de Baskio k Maroko al Germanio; la asturia karbo estas sendata al Italio; la kupron de Huelva mastrumas germana societo; oleo, ledo, bovinoj, terfruktoj k. t. p. estas sendataj tra samaj vojoj. Sed nun ni legas en svisa ĵurnalo jenon: «Antaŭ la Granda Konsilantaro je Nacia Defendo, por konvinki la ĉeestantojn pri la sendo al Franko de 50.000 soldatojn, Mussolini asertis, ke Franko solene promesis sendi al li la hidrargon de la riĉaj minoj de Almaden. Tiamaniere Italio kontrolus la tutmondan produktadon de tiu mineralo.»

● Japana generalo Matsui diris, ke plej grava pruvo pri apogo de Anglio al Ĉinio estas la fakto, ke la ĉina valuto konservas bonan valoron. Tutsame ni povas aserti la samon, ĉar la Franka valuto konservas valoron, ne havante orajn rezervojn.

● En Melilla estis arestataj 250 havenlaboristoj, pro akuzo pri komploto k sabotado kontraŭ italaj k germanaj ŝipoj, alvenintaj la afrikan havenon kun militmaterialo.

● La «Oficiala Bulteno de la Ŝtato» eldonata de la frankistoj en Salamanka, publikigis dekreton, kiu tekstas jene: «Doktoro Negrin, Ferdinando de los Rios; Jozefo Giral, Jimenez Asua k Pittaluga estas forigitaj de siaj postenoj, kiel profesoroj en la Universitato de Madrido.» Ili ne bezonas materie konkeri urbon por «simbole» ordoni punojn...

● Statistiko pri bombardadoj sur Barcelono, ekde la 13. Februaro 1937. ĝis la 10. Februaro 1938, fiksas la nombron da murditoj je 913 k tiun de vunditoj je 2559. La nombro da bomboj ĵetitaj estas 528 k krom la menciitaj viktimoj, okazis disfalo de 862 domoj, plejparte en laboristaj kvartaloj.




La sorĉa skota melodio

● En Francio estas arestitaj kvar hispanaj faŝistoj, kiuj surhavis ampolojn, enhavantaj venenan substancon, per kiu ili celis mortigi tri elstarajn respublikanojn, kiuj troviĝas nun en tiu lando. En tiu afero intervenas diligente franca juĝisto.

● Reprezentantoj de la anglaj laboristaj organizoj, vizitinte urbojn k frntojn en nia lando, deklaris i. a. «Ni venas al la konkludo, ke la politiko de Ne-Interveno estas mantelo, sub kiu la diktatoroj portugalaj, germanaj k italaj metode invadis Hispanion, pere de la faŝistaj internaciaj trupoj. La frankistaj fortoj estus venkitaj, post kelkaj monatoj, sen la amasa importado de trupoj, armiloj k municio el la faŝistaj landoj. Tere k mare, ili efike k meldece kunlaboris al la blokado, kiu malhelpis la hispanan Registaron daŭrigi sian laŭleĝan k normalan komercon.»

● En respublikana zono la situacio normaliĝis, laŭ financa aspekto, ĝis tiel tre supera grado, ke la lojalaj provincoj pligrandigis la pagojn de impostoj dum la dua duono de 1937; kompare al sama periodo de 1936. la pligrandigo atingis 60.391.256 ptojn.

● Emilo Vandervelde, interalie, deklaris en Barcelono al ĵurnalisto: «Mi estas aktiva batalanto en via lukto, pro diversaj kaŭzoj. Kiam elŝprucis la militistara faŝista ribelo, granda parto de la tutmonda opinio kredis bonfideme, ke la venko de la ribelintoj estus tuja. Mi nel Mia ĝojo estas nun duobla reveninte el Madrido, k mi povas diri ke nur la Respubliko povas gajni la militon, k ĝi gajnos kontraŭ ĉiuj k super ĉio. Lastan jaron mi eksiĝis el mia posteno en Van Zeeland-registaro, ĝuste ĉar mi havis opinion kontraŭan el tiu de miaj kolegoj pri la afero de Hispanio».

● Freŝa statistiko, pri la murdemo de la faŝistoj en Baskio, starigas ciferojn pri la agado de la germana k itala aviadilaro en la servo de Franko. De la 31. Marto 1937, ĝis fino de Junio 1937, t. e. dum tri monatoj, la nombro da bomboj disĵetitaj sur la lando estas 162.000 kun pezo je 2.842 tunoj, laŭ sekvanta detalo: 1.900 bomboj de 250 kgj.; 1.200 de 100 kgj.; 24.300 de 50; 134.600 pli malpli pezaj.



GRANDI
La faŝisto Makiavelo

● La gvidantoj de «Fondaĵo Carnegie» en Usono voĉdonis en Nov-Jorko rezolucion, el kiu ni eltiras jenan fragmenton: «Ni konsideras, ke mondo tia, en kiu oni ne diferencigas tiujn, kiuj subtenas sian parolon de tiuj, kiuj gin perfidas; inter tiuj, kiuj volas vivi pace kun siaj najbaroj k tiuj, kiuj sisteme atencas la aliajn, estas mondo kondamnita al la regado de la glavo. En mondo tia ne estas nacio, ĉu granda ĉu malgranda, kiu povas senti sin sekura; ankaŭ ne kontinento, ne eĉ la amerika kontinento». Grafo Sforza, pridemandite de amerika ĵurnalisto komentis tiun rezolucion tiel: «Fine jen homoj, kiuj ne praktikas la politikon de la struto, k kiuj agnoskas la tragikan veron: la abismon inter la du Eŭropoj!»

● Delegitaro de francaj batalantoj de la mondmilito, vizitis la deponejojn de artaĵoj en Madrido; dum sia vizito, ili miris kun entuziasmo pri la mirindaĵoj zorge kolektitaj k ŝirmitaj kontraŭ ĉiuj danĝeroj, k deklaris skribe: «Kolektante eĉ en la plej etaj vilaĝoj k protektante, kun ekstrema zorgo, kontraŭ la grenadoj k obusoj de la faŝismo, la sennombrajn artajn trezorojn de Hispanio, la Respubliko savis dek jarcentojn de historio k preparis la estonton. La mondo scios iam kiom da klopodoj faris nun Hispanio por konservi siajn artajn riĉaĵojn. Ni atestas, ke ni miris pro ĉio kion ni vidis en la muzeoj, bibliotekoj k lernejoj de Madrido, en kampo de arto k popola kulturo».

● En amaskunveno, okazinta en Valencio la 20. Februaro por festi la datrevenon de la kreiĝo de la Popola Fronto en Hispanio, partoprenis oratoroj el ĉiuj tendencoj, nome: respublikanoj, socialisto, komunisto, anarkisto k reprezentantoj de U. G. T., C. N. T. k liberecana junularo; ĉiuj esprimis sian bonvolon al kunlaboro k sian fidon al la popola venko. Similaj mitingoj okazis ankaŭ la saman tagon en ĉiuj urboj k vilaĝoj de la tuta lojala lando, partopreninte reprezentantoj de ĉiuj politikaj k sindikataj tendencoj en plena harmonio.

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

**Ĝenerala Internacia Adreso**
nur por mono
GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

**NEDERLANDA ADRESO**
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

**BELGIO**
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Poŝtĝiro 199106
CHARLEROI

**ANGLIO**
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

**SVEDIO**
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Poŝtĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 49'90 | ptoj. |
| E. M.—Castuera | 5 | » |
| P. V.—Albacete | 10 | » |
| S. P.—Polan | 10 | » |
| J. T.—Adecinca | 25 | » |
| P. S.—Orihuela | 10 | » |
| R. P.—Torrello | 5 | » |
| J. B.—Cartagena | 5 | » |
| J. G.—Malgrat | 5 | » |
| R. M.—Madrid | 25 | » |
| A. M.—Bugarra | 6 | » |
| M. V.—Polan | 15 | » |
| A. B.—Madrid | 84 | » |
| A. S.—Amposta | 30 | » |
| J. B.—Bazo 7.ª | 10 | » |
| Germana Kamarado | 7 | b.fr. |
| F. C.—Bruselo | 5'60 | » |
| C. P.—Bruselo | 5 | » |
| E. S.—Molu par Modave | 10 | » |
| C. C.—Walvourt | 25 | » |
| M. D. Venditaj broŝuroj. — Charleroi | 55 | » |
| F. L. E Sekcio 10 D. K.—Amsterdam | 1'02 | gd. |
| D. K.—Leenwarden | 1 | » |
| P. A. v. E.—Arnhem | 1'50 | » |
| J. v. B.—Amsterdam | 2 | » |
| J. J. S.—Amsterdam | 1 | » |
| J. M. F.—Utrecht | 1 | » |
| H. t. H.—Amsterdam | 0'50 | » |
| D. J.—Amsterdam | 1 | » |
| V. D. S.—Schiedam | 0'50 | » |
| J. v. d. V.—Schiedam | 0'50 | » |
| L. V.—Listo 3.—Haarlem | 0'95 | » |
| » » 4.—Haarlem | 3 | » |
| » » 6.—Haarlem | 1'80 | » |
| » » 5.—Haarlem | 1 | » |
| M. J. B.—Utrecht | 1 | » |
| H. A. B.—Bussum | 1 | » |
| T. Z.—Heerlen | 1'20 | » |
| FLE Sekcio 5.—Rotterdam | 1'15 | » |
| G. J. W.—Den Haag | 2 | » |
| H. C. M.—Haarlem | 1 | » |
| J. A. V.—Maashuis | 1'50 | » |
| D. v. M.—Amsterdam | 0'20 | » |
| L.—Amsterdam | 0'05 | » |
| D. J.—Amsterdam | 0'36 | » |
| FLE Sekcio 8, R.—Rotterdam | 2 | » |
| » » 8, J. B.—Rotterdam | 0'50 | » |
| » » 8, W. S.—Rotterdam | 0'20 | » |
| A. S.—Finnlando | 20 | f. mk. |
| R. G.—La Ferte Alais | 20 | ffr. |
| M.—Malville par Savenay | 20 | » |
| D.—St. Come | 10 | » |
| A. S.—Tours | 10 | » |
| A. M.—Montpellier | 10 | » |
| J. J.—Husovice | 30 | » |
| F. H.—Prostejov | 50 | » |
| C. P.—Vaulx en Velin | 10 | » |
| L. E.—Paris | 15 | » |
| A. R.—Valentigney | 10 | » |
| L. E. S.—Aarhus | 64'10 | » |
| M. L.—Tours | 20 | » |
| V. Z.—Praha | 20'85 | » |
| H. B.—Paris | 12 | » |
| J. W.—Zurich | 30 | » |
| E. J.—Praha | 52'09 | » |
| J. J.—Praha | 52'08 | » |
| V. S.—Hradiste | 20 | » |
| J. B.—Frystat | 52'08 | » |
| S. Corsham | 10'50 | » |

## AVERTO

Ĉiuj afablaj eksterlandaj subtenantoj de POPOLA FRONTO estas insiste petataj sendi *ĉiam* siajn mondonacojn k eĉ la respondkuponojn al iu ajn el niaj internaciaj financaj perantoj. Al nia Redakcio sendu rekte nur la skribaĵojn! Atentu la averton!

## ATENTIGO AL NIAJ KLUBAJ PERANTOJ

Ni ĝentile petas, al ĉiuj niaj klubaj perantoj, fari tuj rimarkojn pri senŝanĝigo, pliigo aŭ malpliigo de la kvanto da ekzempleroj, kiujn ili ricevas per pakaĵeto. Zorgu akurate, kamaradoj, pri tiu grava atentigo!

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

R. B.—Victoria.—Via p. k. fine trafis nin. Viaj gratulaj frazoj nin emociigas. Tutkoran saluton al vi, kara amiko!

W. v. B.-Amsterdam.-Via kuraĝiga letero bone alvenis k ni kordankas ĝian enhavon.

J. C.—Nice. —Treege ni ĝojis leginte vian leteron, kiun ni repondas. Viaj asertoj tute pravas k ni esperas nepran k decan venkon. Tre interesa estas la de vi sendita artikolo, kiu montras neforgesindan aspekton de nia lukto. Tutfrate ni vin salutas.

J. N.—Hago.—Ni ricevis vian leteron k kopion; ni plenumis viajn indikojn. Treege ni estimas viajn salutojn. Amikan manpremon!

F L E Sekcio.—Bruselo.—Vian leteron ni ricevis k respondas. Vere vi pravas; tial do la afero estos aranĝata laŭ viaj indikoj. Vian helpemon ni kordankas. Kamaradan saluton!

R. S. P.—Beograd.—Kun granda emocio ni legis vian kolektivan leteron. Ni sendos regule P. F. tra sama vojo, kiel ĝis nun. Bedaŭrinde ni ne povas sendi la aliajn gazetojn de vi petitaj. Ni esperas k deziras, ke vi daŭrigu ankaŭ vian lukton kontraŭ la ĉiulanda faŝismo. Fratan saluton!

O. T. N.—Voss.—Viajn salutojn k simpatiesprimon ni dankegas. Ni sendos P. F. laŭ via deziro. Koran saluton!

L. E. S.—Vaasa.—Vian leteron ni ricevis k, laŭ via peto, ni publikigas la anonceton. Ankaŭ ni ricevis la r. k. Kamaradan saluton!

J. M.—Troyes.—Vian leteron ni legis kun ĝojo k danko. Tiu tasko estas vere plej efika. Antaŭen, ĝis la venko, kara amiko!

Ch. Ch. Ch.—Yunnanfu.—Elkoran dankon pro via letero kun via portreto. Vi k ni havas devon batali kontraŭ la azian k eŭropan faŝismojn, k ni esperas, ke ambaŭ venkos en tiu lukto por la libero. Vian leteron ni publikigas en ĉi tiu numero.

J. E.—Falun.—Ni ricevis la ekzempleron de *Dala Demokraten* kun traduko de la artikoloj. Dankon por via sindona laboro.

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

SOVETIO. - K-do B. Ŝatunovskij, poŝtkesto 15, Aschabab (Turkmenio), dez. kor. p. ĉ. t. k interŝanĝi k. ĉ. l.

FINNLANDO.—Ni aranĝos internacian kartk letervesperon la 17. de Aprilo. Salutante samideanojn batalantajn kontraŭ internacia faŝismo, ni atendas multenombrajn respondojn. Adreso: Lab. Esp. Soc. «Laboro», Vaasa. Tyov. talo.

HISPANIO. — Internacia brigadano, kamarado S. Vatkov, S. R. I. 65 A., plaza Altozano, 4 g. p. Mijailoff, Albacete, dez. kor. precipe kun kamaradoj en la norda respublikana Hispanio.

TANĜERO. - Por aranĝota ekspozicio oni bezonas materialon pri hispana k ĉina militoj. Adreso: Grupo Esperantista «Paco kaj Amo» Estatuto 62. Tanger.

HISPANIO. - Mi dez. interŝanĝi p. m. k. ĉ. l. popece aŭ laŭ Yvert-katalogo. Ne sendas unue, sed ĉiam respondos! adreso: Francisco Costa, *Popola Fronto*, Mar, 25, Valencia. Filatelista honesteco!